

Turangio 46 Luko



Rompi la voĉon

EN TIU NUMERO VI LEGOS :

La kolerigaj motivoj falas sur Irisan kiel fulmotondra pluvo.

Jean-mary tradukis 2 rakontojn, kiujn li legis sur : https://short-edition.com/fr « Rompi la voĉon ». Kaj « Tri monatoj da atendo ».	p. 1 ĝis 4 p.6 kaj 7
Saliko, la korespondantino de Jeannine kaj Gérard rakontas pri « Efikoj de polusa nokto »	p.5 kaj 6
Jane proponas frandan recepton : « Anaso kun napoj ». Ne konfuzu napoj kaj nepoj !	p.8

Hieraŭ la akvohejtilo ĉesis funkcii. Hodiaŭ matene ŝi atendis la ripariston ĝis la ekstrema templimo. Ŝi rapidegis al la liceo, kien ŝi alvenis malfrue, misparkiĝis. Tuttago ŝi trenis siajn klasojn, provante motivi ilin ; ŝi vane kriis senspiriĝe.



Ĉirkaŭ la 18a ŝi forprenis mal-kuraĝigan cirkuleraron el sia leterkesto. La lasta ŝoko okazis antaŭ la kalendaro de la kulturaj eliroj. Ĉio estis malordigita. Irida estas deĵorigita ĉiuĵaŭde posttagmeze ! La tutan trimestron ! Sed la ĵaŭdo estas netuŝebla ! Ĝi estas ŝia paŭztempo, ŝia oksigenveziko, ŝia kluzkamero de malkunpremo ; ŝi eksplodos se oni forigas tion de ŝi.

Kiu faris tiun interŝangon sen interkonsento ? Maria-Franca Delanero, mi kredas. Tiu pedanta rigidmienulino, kiun ŝiaj kolegoj moknomis « Maljuna-Franca ». Tiu preciozulino, ĉe la sojlo de emeritiĝo, verŝajne prenis al si la rajton havi kapricojn de operstelino ...

Irida hejmeniras, plena de kolero. En la koridoro ŝi ĵetiĝas sur la senordajn ŝuojn de sia filo, elparolas vicegon da trivialaĵoj kiuj ne kvietigas ŝin. Ŝi sentas sin kiel rompiĝema baraĵo. Feliĉe ŝi scias ke ŝi povas kalkuli je sia edzo, pacema viro, ĉiam estanta tie por aŭskulti.

Sed jam estas la 20a kaj Benedikto ankoraŭ ne revenis : pro la tradiciaj bondeziroj en sia firmao. Tri horojn poste li fine alvenas, lacega.

- Nu, Iriza veziko mia, ĉu bona rekomenco de la lernjaro ? ... Senkulpigum, sed nun mi tuj enlitiĝos ... Tiuj trinkfestitaj bondeziroj estas plaĉaj sed lacegigaj ... Antaŭ ol Irida havas la tempon por respondi, ŝia edzo ma-

Centre Culturel Esperanto-
Touraine

Halles de Tours,
place G. Paillhou
37000 TOURS

esperanto-touraine37@wanadoo.fr
<http://esperanto-tours.legtux.org/>

laperis.


- Benedikto ! Atendu, necesas ke mi diru al vi ...

La lampo estas malŝaltita ; Benedikto jam dormas aŭ eble li ŝajnigas dormon. Irida, neregebla, revenas al la salono. Ŝi puŝas brakseĝon ; rastas la malaltan tablon ; disĵetas stakon da taskfolioj. Nenio pacigas ŝin. Ŝia kolero similas al montara torento post fulmotondro, ĝi volas ĉion forporti. Superflui ! Alvali !

Irida malfermis la fenestron : ŝi sufokiĝas ! Kaj subite ŝi levas la vizaĝon - bedaŭrindas ke oni aŭdas ŝin - ŝi rompas la digon, eligante longan sovaĝan krion ... Ŝi kriegas ĝis rompi ŝtonojn, elŝiri la gorĝon ... ĝis esti spirmanka. Poste ŝi lasas sin gliti sur la plankon. Lacega. Elĉerpita.

La morgaŭon, dum Benedikto vigla kaj ripozinta pretigas la matenmanĝon, Irida iom en nebulo leviĝas.

- Nun, Irida, ĉielarko mia, vi volis paroli kun mi pri la komenco de la lernjaro ...



Evidente ŝi bezonis paroli kun li, sed hieraŭ ŝi deziris tion ! Tamen ŝi saltas kun kunigitaj piedoj en la fluon de rankoro, kiu ankoraŭ trapasas ŝin. Kaj jen la vortoj restas blokitaĵoj en ŝia gorĝo ; nur stranga kaj borborigma mistono aŭdiĝas ... Instinkte, la juna virino movas la manon al sia gorĝo, heligas sian voĉon, provas denove, kaj ellasas alian mistonon ! Ho ne ! Voĉestingo.

Kun la kolo ĉirkaŭvolvita en ampleksa skarpo, Irida iras al la liceo. Per kelkaj elokventaj gestoj, ŝi komprenigas al siaj gelernantoj ke ŝi ne povas paroli. Ŝi notas la instrukciojn sur la tabulon kaj ĉar ili ĵus legis la « Antigono de Anouilh », ŝi proponas al ili, ke ili faru la portreton de la ĉefpersono. Izolita en sia silento, ŝi observas tiujn grandajn adoleskantojn laborantajn. Ŝi pasas en la vicoj, legas kelkajn taskojn ... Banalaĵoj, ne tro da eraroj ... Ha ! Tiu vekas sian atenton ... Originala vidpunkto. Ŝi tuŝas la ŝultron de Audrea, kuraĝigas ŝin ekdebari kun siaj gekamaradoj. Unue timetema, la junulino fine aŭdacas komenci. Ŝia voĉo firmiĝas. Eĉ la endormiĝintoj streĉas la orelojn ; unua mano leviĝas. La diskuto komenciĝas, pasia. Meze de la ĉambro Irida aspektas kiel ludjuĝisto sen fajfilo dum decida futbalmaĉo ... Antaŭ longe ŝi atingis tian konsenton en kurso. Kiam la sonorilo indikas la finon de la du horoj, ili estas ĉiuj surprizitaj, ŝi tiom, kiom la lernantoj ...

Ankoraŭ ĝojigita de tiuj entuziasmaj interŝanĝoj, Irida sidiĝas ĉe la skribtablo por kompletigi sian kajeron de tekstoj. Du diskretaj frapetoj. Estas Maria-Franca Delanero ...

- Bonan tagon, Irida, mi volis paroli kun vi ... klarigi al vi ... nian programon de la eliroj... Fronte al la silento de sia kolemino, ties gestaro kaj skarpo, Maria-Franca komprenas : Ho !

Dio mia, vi estas senvoĉa ? Vi devintus resti en la hejmvarmo ...Mi konfuziĝas.

« Kaj vi ja bonŝancas ke mi estas senvoĉa, Olda Kamaradino, sarkasme diris al si Iris, ankoraŭ tro plenigita de ribelo, ĉar vi aŭdintus multajn malagrablaĵojn, kredu min ... »

- Necesas ke mi parolu al vi, Irisa. Eble vi sciis ke dum la aŭtunaj ferioj, mi estis operaciita pro kisto. Nu tiu montriĝis esti tumor. Tre maligna ... Mi komencis ŝokkemiterapion. Dek ses seancoj. Unu ĉiusemajne.

— ...

— Vi scias ke mi estas en mia lasta jaro por instrui. Mi, kiu revis brile fini mian karieron, jen mi estas devigata limigi la damaĝon. Kun la estraro, ni kiel eble plej bone restrukturis mian horplanon. Nur vi konos la situacion. La pankreata kancero ne estas la plej pardonema ...

Sed laŭ la diroj de la kuracisto, la pozicio de la tumor estus kuraĝiga ...Kaj mia edzo kaj miaj du filoj estas tre proksimaj, tre atentoplenaj, sed pro sia amo mi devas montri min forta ... Tio estas peza.

La voĉo de Maria-Franca iom tremas. Ŝi rigardas Irisan, kvazaŭ ŝi farus helppeton. Ili staras tie, unu fronte al la alia ; ĉar, en sia kolero, Irisa eĉ ne pensis inviti sian koleginon sidiĝi.

Kaj jen ŝi estas tre afekciita, emociplena. Ankaŭ terurita pensante pri la veneno, kiun ŝi povintus elkraĉi se ŝia voĉo ne forlasintus ŝin hodiaŭ matene. Ŝi dezirus diri : « Mi estos tie por vi, Maria-Franca. Mi estas tie. »

Irisa estas konfuzita de tio, kion ŝi sentas. Ŝi estas emociskuata de tiu sufero, malhelpata en siaj paroloj, kaptita de anima proksimeco kiu korprenas ŝin. Tiam ŝi faras ion neatenditan, ekstravagancan ; ŝi malfermas la brakojn ... Kaj okazas neprobablaĵo, Maria-Franca rifuĝas en ili per unu nura impeto ; lasas sin ĉirkaŭpremi, pacigi.

— Se mi aŭdacus, longe antaŭe, mi ŝatintus havi amikinon tian, kia vi. Vi estas juna virino kuraĝa , energia ... sed mia supraĵa aspekto ĉiam fuĝigas, mi ja scias ... Maria-Franca plu parolas, akceptata, rekonata en la rigardo de sia juna koleginino, tiel proksima, tiel simila.

Kiam Irisa alvenas hejmen, la okazaĵoj ne plu havas la saman signifon. Ŝi ne plu vidas la vivon tra la sama prismo ...Kio estis vivnecesa hieraŭ, tio iĝis malgrava : varma bano aŭ posttagmezo por gapvagi, kian gravecon tio havas, ĉar la vivo fluas, kun ĝiaj surprizoj, donacoj, kundividoj.

« Fakte, necesus ke mi pli ofte estu senvoĉa » grave diris al si Irisa.

Artikolo tradukita el la franca far Jean-Mary Simonet

Efikoj de polusa nokto

Ĉe la norda poluso daŭra vintra nokto komenciĝas la 24an de septembro, finiĝas la 19an de marto. En la plej norda finlanda loko, Utsjoki, la suno ne leviĝas dum preskaŭ du monatoj vintre. La daŭro de la senluma sezono dependas de latitudoj. Ĉe la arkta cirklo (67,1 gradoj de norda latitudo) sentaga nokto okazas inter la 20a kaj la 22a de decembro. La malhelo efikas homojn en ĉiuj nordaj landoj : Skandinavio, norda Rusio, Islando, Grenlando, Kanado, Finnlando. Rekompence oni somere ĝuas blankajn noktojn, senfinan tagon, kiam la suno ne subiras.

En Finnlando 10-20 elcentoj de la loĝentaro suferas pro deprimado kaŭzita de lumomanko. Kvardek elcentoj suferas de vintra laceco. Finna lingvo havas vorton por la senluma sezono : « kaamos ». Simptomoj de vintraj deprimado kaj laceco estas dormemo, manĝemo, plidikiĝo, malgajeco, manko de iniciativo. Homoj kondutas iom kiel la bestoj, kiuj travintris dormante sub tero kaj neĝo. Lumomanko influas la pinealan korpon kaj ties hormonproduktadon, kion sciencistoj ne ankoraŭ povas plene klarigi. Estas tamen sciate, ke manko de lumo antaŭe en Nordio malrapidigis kreskon kaj seksan maturiĝon de infanoj. Nuntempe la abunda elektra lumoj jam kontraŭe efikas.

Kontraŭ vintra deprimado kaj laceco oni uzas lumon de 2500-5000 luksoj. Sufiĉas duonhora aŭ hora restado en tia lumego matene. Tial kelkaj homoj havas specialan lumigilon ĉe la manĝotablo. Se oni laboras nokte, oni uzas la fotan lumon vespere.



Krome oficeje povas troviĝi lumoj kun la bezonata lumego. Ĉe haltejoj de tramoj kaj busoj kelkloke brilas 3500-luksaj paneloj, ĉe kiuj homoj baniĝas en lumoj. Aldone oni povas uzi la samajn medikamentojn kiel kontraŭ depresio, sed ili havas nedeziratajn flankefikojn. Kelkaj norduloj uzas vitaminon C por kuraci sin vintre.

Ankaŭ homoj ne grave suferantaj pro manko de lumoj provas gajigi kaj pli vigligi sin vintre. Fine de novembro ili elŝrankigas elektrajn kandelojn, kiujn ili metas ĉe fenestroj. Lumoĉenojn ili metas sur arbojn ĝardenoj kaj balkonoj. Urboj lum-ornamas siajn stratojn. Okazas specialaj lumosemajnoj. Hejmojn beligas florantaj plan-



toj importitaj, kiaj tulipoj, amarilidoj, hiacintoj, azaleoj, julokaktoj. Estas ĝojige vidi kaj vidigi per tablo tukoj, bondeziraj kartoĵoj, kandeloj kaj ornamaĵoj kolorojn, kiuj mankas en vintra naturo : ruĝa, flava, oranĝa, ora, fort ablua kun blanko. Antaŭ ol falas la una neĝo, ni elarbarigas verdaĵojn. Novembre-decembre lertaj manoj plektas girlandojn kaj kronojn el pino, piceo, junipero, likopodio, vakcinio, musko k. a. por pordoj kaj balustradoj. Cio tio kulminas la 24an de decembro, kiam komenciĝas festa sezono daŭranta ĝis la 6a aŭ la 13a de januaro. En hejmoj, festosalonoj, honoran lokon okupas vera aŭ artefarita piceo aŭ abio brile kaj bunte ornamita, xiam kun stelo ĉe la pinto. En preĝejoj, skvaroj kaj placoj julaj piceoj staras ornamitaj per lampo-ĉenoj, kiuj lumas tra la tago aŭ almenaŭ ekde frua posttagmezo ĝis malfrua mateno. Kvankam la klimato nun ŝanĝiĝas kaj frosto, glacio kaj neĝo malpliiĝas, la lumo en Nordio ne pliiĝas. Tio kaŭzas malfacilaĵojn kaj arktaĵojn specioj de plantoj kaj bestoj. La plantoj povas suferi pro milda vetero, kiu revivigas ilin, kvankam mankas lumo. Kelkaj bestoj, kies hararo aŭtune ekblankiĝas por imiti neĝon, akre distingiĝas en senneĝa pejzaĝo. Rabobestoj facile kaptas tiajn. Finnoj provas preventi la rariĝon de arkta vulpo (*Alopex lagopus*), kies vivregionon kaj nestejojn nun ekkonkeras la kutima, pli granda vulpo ruĝfela (*vulpes vulpes*).

Polusa nokto, arkta malvarmo kaj neĝo komplike efikas sur ĉiuj estaĵoj en Nordio.

Kvankam la klimato nun ŝanĝiĝas kaj frosto, glacio kaj neĝo malpliiĝas, la lumo en Nordio ne pliiĝas. Tio kaŭzas malfacilaĵojn kaj arktaĵojn specioj de plantoj kaj bestoj. La plantoj povas suferi pro milda vetero, kiu revivigas ilin, kvankam mankas lumo. Kelkaj bestoj, kies hararo aŭtune ekblankiĝas por imiti neĝon, akre distingiĝas en senneĝa pejzaĝo. Rabobestoj facile kaptas tiajn. Finnoj provas preventi la rariĝon de arkta vulpo (*Alopex lagopus*), kies vivregionon kaj nestejojn nun ekkonkeras la kutima, pli granda vulpo ruĝfela (*vulpes vulpes*).

Polusa nokto, arkta malvarmo kaj neĝo komplike efikas sur ĉiuj estaĵoj en Nordio.

(10a-11a horo, kiam iom supreniras la suno). La publika julioarbo de urbo povas alti dekojn da metroj, kaj gigantaj piceoj estas donacitaj aŭ venditaj al eksterlando. Novembre-decembre oni ankaŭ okazigas festetojn « juleto », kie oni bone manĝas, drinketas, dancas, babilas kun geamikoj aŭ gekolegoj. Ne malmultaj finnoj vojaĝas al sunaj sudaj landoj por tie « reŝargi siajn bateriojn » je lumo dum unu du semajnoj. Samtempe suduloj turismas en Nordio por vidi niajn vintrajn kondiĉojn.



La polusa nokto ne estas peĉe nigra. Ioma lumo reflektiĝas el sub la horizonto, brilas steloj kaj luno. Regas mistera krepusko, jen blua, jen griza. Ĉian lumon reflektas neĝo. Jen kaj jen aperas la norda lumo, aŭroro boreala, kiu fulmrapideflagras tra la ĉielo verde, flave, violekaj ruĝe. Se oni volas fotografi tiajn vidaĵojn, oni bezonas speciale sensitivan filmon aŭ ciferan fotilon.

Saliko

Tri monatoj da atendo



pôle emploi

- Tamen estas jam la tria fojo en kvar jaroj, sinjoro Langlojo...
- Mi ja scias, sinjorino...
- Kial vi ne sukcesas konservi laboron ?
- Mi ne sukcesas havi ion alian krom KDD-ojn...(*1)
- Jes sed la problemo estas ke vi neniam laboras sufiĉe longe por rajti ricevi senlaborulajn monhelpojn.
- Jes tio estas ja la problemo...
- Nu... Ni tuj refaros dosieron por ESA(*2). Ĉu vi kunportis ĉiujn necesajn dokumentojn ? Identigilon ? Malsanulasekurilon ? slipon de civila stato ? Aliĝilon al la dungiga agentejo ?

Loĝejan atestilon ?

- Mi estis elpelita el mia unuĉambra loĝejo hieraŭ...
- Kiel tio eblas ? Kutime tio estas proceduro kiu necesigas tempon... vi devintus viziti nin antaŭe...
- Ĝi estas meblita luloĝejo.
- Ha jes kompreneble, se ĝi estas meblita luloĝejo...
- Sed mi ne povas lupreni ion alian. Vi scias kiaj estas la bienagentejoj : neniuj KND (*3), neniuj lupreno...kaj necesas pruvi ke oni perlaboras minimume trioble la luprezon ...
- Ĉu vi faris peton por loĝejo en H L M (*4) ?
- Antaŭ du jaroj...
- Kaj ĉu vi ne ricevis novaĵojn ?
- Jes ja, oni diris al mi ke miaj enspezoj estas tro malregulaj.
- Estas vere, bedaŭrinde... Atendante ke oni trovos solvon por vi, kie vi loĝos ?
- Ĉe amiko... sed mi verŝajne ne povos restadi longtempe.
- Ha sed tio starigas problemon...Kiun metion faras via amiko ?
- Li estas senlabora...
- Ĉu vi scias ke vi ne rajtas profiti la ESA-n (*2) se vi kunloĝas kun persono kiu havas enspezojn ?
- Tamen mi ne deziras dormi surstrate...
- Estas hejmoj...
- Dankon... Mi jam spertis tion...
- Nu, aŭskultu... Mi bonvolas registri vin kiel senhejmulon...Nur indiku tiun oficejon kiel poŝtan adreson sur tiu dosiero. Vi povos veni ĉi tien por preni vian poŝtaĵon.
- Kaj kiam mi povos enspezi la ESA-n (*2) ?
- Estas atendo de tri monatoj. Vi ja scias tion, ĉu ne ?
- Kaj per kio mi vivas ĝis tiam ?
- Ĉu ne estas iu en via familio kiu povus helpi vin intertempe ?
- Ne...
- Eĉ viaj gepatroj ?
- Miaj gepatroj mortis...
- Kaj via amiko, ĉu li ne povas pruntedoni al vi iom da mono ?

- Kion vi kredas, fek, baldaŭ finiĝos lia rajto pri monhelpoj !
- Ha bonvolu resti kvietaj, mi petas ! Ne utilas esti malĝentile, mi faras kion mi povas por helpi vin.
- Mi scias, sinjorino... Pardonu min...
- Sed estas vere ke via situacio ne estas facila.
- Se mia situacio estus facila, mi ne estus tie.
- Ŝajnas ke vi ne faras grandan klopodon por elturniĝi el ĝi.
- Tian impreson mi ne havas ...
- Ĉu vi havas projekton ?
- Jes, manĝi hodiaŭ vespere...
- Mi povas doni al vi kuponojn por nutraĵo.
- Lasu... Oni kuiras al si pastaĵojn kun mia kunulo...
- Bone... mi kredas ke via dosiero por ESA (*2) estas kompleta. Mi tuj aranĝos alian rendevuon post tri semajnoj por vidi kie vi estas en via dungserĉado... kvankam en via situacio – preskaŭ kvindekjara, tro da diplomoj por pretendi manlaboron sed neniuj fiksa posteno de pli ol dek jaroj – mi ne bone vidas kion vi povus trovi...
- Nu ankaŭ mi ne, kredu min...
- Kaj kio nova pri via C hepatito ?
- Mi ne scias... Mi pli bone fartas de kiam mi haltis drinki...almenaŭ ŝajnas...
- Ĉu vi ne sekvis kuracadon per interferono ?
- Mia kunulo sekvis tian, sed tio igis lin tiel malsana ke mi ne aŭdacis. Krome tio ne sanigis lin, nu...
- Se vi estos malsana, estos al vi ankoraŭ pli malfacile por trovi laboron...
- Mi ja scias...
- Bone, bone, bone...Iru tamen al la loĝeja servo de la urbodomo por refari vian peton por HLM (*4). Mi dubas ke tio havos rezulton, sed tio favore impresos en la dosiero, tio pruvos ke vi faras ion por solvi vian problemon pri loĝejo. Oni revidos sin merkredon la dudekan je la deka... Ĉu vi konsentas ?
- Mia agendo lasas al mi multan liberton... Ĝis la revido sinjorino...
- Ĝis la revido, kaj eltenu. Tio kontentige baldaŭ solviĝos ... finfine tio kontentige ĉiam solviĝas.

Tri monatojn poste

Letero sendita de la oficejo de S... al la Departementa Direktejo de la Ago Sanitara kaj Sociala.

Objekto : peto por atribuo de ESA (*2) al sinjoro Langlojo, senhejmulo, sen monrimedoj, domicilita en la urba suboficejo de la DDASS (*5).

Sinjoro Langlojo forpasis la 16an de tiu monato, pro la sekvoj de ne kuracita C hepatito, en la servo de intensa medicino de la malsanulejo de S... Tiu forpaso kadukigas la peton por atribuo de ESA (*2) kaj kuntrenas la fermon de la dosiero pri MAU (*6). Ĉar sinjoro Langlojo ne havas konatajn heredonton kaj pagopovan parencon, peto por kostokompenso pro la enterigo en la por senhavuloj rezervita komuna terpeco de la urba tombejo estis sendita al la socialaj servoj de la urbodomo de S...

Gizela C...

Konsilistino pri readaptado

La originala verko estis france verkita de Gobu kaj legeblas ĉi tie :

<https://short-edition.com/fr/oeuvre/tres-tres-court/trois-mois-de-delai>

*1 : KDD, Kontrakto kun Determinita Daŭro, france : CDD, Contrat à Durée Déterminée

*2 : ESA, Enspezo de Solidareco Aktiva, france : RSA, Revenu de Solidarité Active

*3 : KND, Kontrakto kun Nedeterminita Daŭro, france : CDI, Contrat à Durée Indéterminée

*4 : HLM, Hejmo kun Lupago Moderpreza, france : HLM, Habitation à Loyer Modéré

*5 : DDASS, Departementa Direktejo de la Agado Sanitara kaj Sociala, france : Direction Départementale de l'Action Sanitaire et Sociale

*6 : CMU : MalsanulAsekuro Universala, france : Couverture Maladie Universelle

Artikolo tradukita el la franca far Jean-Mary Simonet

Anaso kun napoj

Ingrediencoj :

- Anaso (1,2 kg proksimume)
- Malgrasa lardo: 100 g
- Bona blanka vino : kelkaj glasoj laŭ bezono (de la kuiristo ?).
- 1 ŝaloto
- 1 napo (500g)
- Salo, pipro ; timiano
- 200 g da butero aŭ da oleo.



En kuirpoto fandu lardon tranĉitan en malgrandajn pecojn, metu tien anason sentripigitan kaj ligitan. Pririgardu por ke ĝi orkoloriĝas ĉiuflanke.

Ce la fino metu ŝaloton haketigitan, orkolorigitan, sed ĝi ne devas bruli.

Kiam la anaso estas orkolorigita, malsekigu ĝin per 2 glasoj da blanka vino, salu, pipru almetu timianon.

Kuiru per malforta fajro kun kovrilo dum tri kvaronoj aŭ unu horo, kontrolu la kvanton de saŭco en la kuirpoto.

Dum tiu kuirado, senŝeligu napon, tranĉu ĝin en malgrandajn kubojn, metu ilin subrosti en fritilon (aŭ paton) kun oleo aŭ butero. Kuiru per malforta fajro, movigu per ligna kulero de tempo al tempo, por ke ĝi ne ligus.

Versu ĝin en la kuirpoton kun la anaso, malgrandan tempon antaŭ la fino de la kuirado.

Servu varme en varmajn telerojn.

Memkompreneble, la anaso devas esti detranĉita.

Eblas ke la dommastro detranĉas ĝin. En tia okazo, metu saŭcon aparte en saŭcujon

Bona roza vino de Bordojo aŭ de Burgejo povas akompani tiun manĝaĵon.

Jane Piŝon